

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## IKEF-vojaĝo al Ĉinio

Ĝis hodiaŭ (12 marto) anoncis sin 8 kandidatoj; la minimuma kvanto por organizi la vojaĝon estas 12 personoj. Pliaj interesitoj anoncu sin plej laste je 10 aprilo 2004 ĉe [ikef\(a\)pandora.be](mailto:ikef(a)pandora.be) kaj [informo\(a\)komerco.com](mailto:informo(a)komerco.com). Plej laste je 20 aprilo mi havigos decidon pri okazigo de la vojaĝo kaj paginstrukcion por la antaŭpago de 250 USD. Prezo nun estas definitiva je 780 USD. Aldona kosto por unulita ĉambro estas 140 USD. (rr)

## Brazila Peranto

En LM 83, p. 6, aperis la kandidatigo de Silvio KNISS MATES kiel brazila peranto ([silvio\(a\)siscobras.com.br](mailto:silvio(a)siscobras.com.br)). Lia propono estis akceptita kaj ekde nun brazilaj membroj povas pagi pere de li. (Banco do Brasil SA, Branĉo 3174-7, konto 6999-x, RS 40,00) (rr)

## Enhavo

Raportoj pri la agado de IKEF dum 2003 .....	4-7, 10-11
Komercaj petoj kaj proponoj .....	8-9
Oferti servojn, ne lingvon .....	12-13
Skype: revolucia ilo por la E-movado .....	14-15
Internacia pakportalo en Esperanto .....	17-19

**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

**Estraro de IKEF:** S-ro Franz Josef BRAUN, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland ROTSAERT, Financa Konsilanto; S-ro Silvio KNISS MATES; D-ro Rainer KURZ; Prof. OOBA Atsua; S-ro WANG Tianyi **Revizoro por la financa raporto:** D-ro Gianfranco POLERANI. **Centra sidejo:** Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

### **Financa sidejo kaj membrara administrado:**

Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio, telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: [roland.rotsaert\(a\)pandora.be](mailto:roland.rotsaert(a)pandora.be).

La jara **membrokoto** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio 'A' ('riĉaj landoj') kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio 'B' ('malriĉaj landoj'). Tarifo por komuna membreco de IKEF kaj TAKE: 27 EUR (kat. A) aŭ 18 EUR (kat. B) jare. Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptata. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokoto. Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Membroj kiuj aliĝas meze de la kalendaraj jaroj pagu 1,5-oblan kotizon (t.e. por 18 monatoj).

### **Kontoj:**

- ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*  
- belga poŝtekkonto: n-ro 000-1592629-83 (IBAN: BE14 0001 5926 2983, BIC: BPOTBEB1)

### **Perantoj**

**Internacie:** Flandra Esperanto-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto [financoj\(a\)fel.esperanto.be](mailto:financoj(a)fel.esperanto.be))

**Brazilo:** Silvio KNISS MATES ([silvio\(a\)siscobras.com.br](mailto:silvio(a)siscobras.com.br); Banco do Brasil SA, Branĉo 3174-7, konto 6999-x, RS 40,00)

**Ĉinio:** S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto [komerco\(a\)public.xa.sn.cn](mailto:komerco(a)public.xa.sn.cn)

**Francio:** S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto [efikso\(a\)aol.com](mailto:efikso(a)aol.com)

**Germanio:** S-ro F. J. BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), tel. +49-7223-942064, fakso 942065, retpoŝto [f.j.braun\(at\)-online.de](mailto:f.j.braun(at)-online.de)

**Hungario:** D-ro GETHER I., Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST, [istvan.gether\(a\)office.ksh.hu](mailto:istvan.gether(a)office.ksh.hu)

**Italio:** D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto [g.polerani\(a\)tiscalinet.it](mailto:g.polerani(a)tiscalinet.it) (poŝta konto 37485208)

**Japanio:** S-ro YAMASAKI Seikō, J-185-0014 Tōkyō, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto [svama\(a\)qf6.so-net.ne.jp](mailto:svama(a)qf6.so-net.ne.jp) (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

---

## **Raporto pri la agado de IKEF dum la jaro 2003**

### **Administrado**

#### **Grava atentigo al niaj membroj:**

La estraro prezentas sur la sekvaj paĝoj sian raporton pri la agado de IKEF dum la jaro 2003 kaj proponas aprobon de tiu raporto.

La estraro prezentas sur la paĝoj 7 kaj 10-11 la financon raporton de IKEF por la jaro 2003, notante ke la ciferoj estas prezentitaj en bona tempo al la revizoro. D-ro Polerani juĝis ilin en ordo. Tial la estraro proponas aprobon de tiu financa raporto.

La estraro notas la sumon de financa neta gajno de 415,99 EUR kaj proponas aldonon de tiu gajno al la kapitalo.

La estraranoj s-ro Franz Josef BRAUN (prezidanto, IKEF 4), d-ro Rainer KURZ (IKEF 235) kaj s-ro Wang Tianyi (IKEF 117), ĉiuj elektitaj en 2002 dum la UK en Fortaleza, baldaŭ estos du jarojn en sia ofico. Laŭ la Statuto de IKEF, alineo 7.1, dua frazo, estrarano tenas sian oficon por du jaroj. Ilia estraraneco finiĝos en julio ĉi-jare. Reelekto eblas. Ĉiuj pretas denove kandidatiĝi, kun la escepto ke Braun nur kandidatiĝos por unu jaro, ĝis 2005. En la nomo de IKEF, la aliaj estraranoj dankas ilin pro la laboroj faritaj dum la pasintaj du jaroj kaj proponas reelekton de ili.

Nia Statuto, alineoj 7.4 kaj 8, montras la procedon pri aprobo de la raportoj pri agado kaj financo. Ĉi-jare ni denove organizos Ĝeneralan Kunvenon por niaj membroj kadre de la 89-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino, Ĉinio. Diskutado kaj aprobo de la raportoj (vidu erojn 1 – 3 supre) kaj elekto de estraranoj (vidu erojn 4 supre) okazos tie.

Membroj kiuj ne povas veni al Pekino, rajtas skribi komisiu alian membron ĉeestontan pri aprobo kaj voĉdonado; tian agon la estraro rekomendas. La precizan daton, horon kaj salonon de nia Ĝenerala Kunveno ni avizos en venonta „La Merkato” n-ro 85, komence de julio 2004.

La Estraro de IKEF

---

## **Raporto**

### **Membronombro pli falis**

Dum la jaro 2003 la membronombro falis al 109. Nove aliĝis 8, dum mortis 3 (Santiago ALVAREZ, IKEF 307, Gilbert LEDON, IKEF 177, Jiri VOMACKA, IKEF 172). Pro nepago de kotizoj la estraro estis devigita eklogi 34 membrojn.

La 109 membroj venas el 33 landoj, inter ili 18 el Germanio, 13 el Belgio, 13 el Ĉinio, 11 el Francio, 6 el Japanio, landoj kun la plej alta nombro. Inter ĉiuj troviĝas 7 dumvivaj membroj. La nombro de perantoj restis je 7.

### **'La Merkato' regule aperis**

Ankaŭ dum 2003 nia interkomunikilo 'La Merkato' regule kaj tre akurate aperis kvarfoje.

### **Verka agado**

La verka agado, kiu okazas precipe en 'MONATO', internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo, dum 2003 falis laŭ nombro de kontribuoj. Kaŭzo por tio estis ĉefe la morto de Gilbert LEDON, kiu estis unu el la plej aktivaj verkantoj. Ĝenerale la nomoj de aŭtoroj ne esence ŝanĝis kompare al la antaŭa jaro. Jen tiuj nomoj: S-roj Gilbert LEDON (IKEF 177), MU Binghua (IKEF 213), Jiri PATERA (IKEF 276), Paul PEERAERTS (IKEF 65), Roland ROTSAERT (IKEF 3), YAMASAKI Seiko (IKEF 43), Serge ZANDANDU NTOMONO ZOLA (IKEF 181).

Ni denove atentigas niajn membrojn pri la fakto, ke 'MONATO' rolas kiel ĉefa podio por nia verka agado, kaj ni rekomendas al ili la abonon de ĝi.

### **Kongresaj aranĝoj**

Dum la 88-a UK en Gotenburgo, Svedio, okazis je 1 aŭgusto 2003 la jara Ĝenerala Kunveno de IKEF kun 25 ĉeestintoj, grandparte membroj, sed ankaŭ interesitoj. Pro malĉeesto de prezidanto Franz Josef BRAUN, s-ro Roland ROTSAERT, financa konsilanto kaj membraradministranto, prezidis la kunvenon, dume estrarano d-ro Rainer KURZ gvidis tra la parto de diskutado.

La raporto pri la agado de IKEF kaj la financa raporto por 2002 estis aprobitaj, kaj sub gvidado de nia revizoro d-ro Gianfranco POLERANI (IKEF 12) la estraro estis malŝarĝita. En la elekto por la estraro la ĝistiamaj estraranoj s-roj Francois Xavier GILBERT (IKEF 14) kaj KÖNYVES Zoltán (IKEF 77) ne plu kandidatiĝis kaj adiaŭiĝis el la estraro. Prof. Ooba Atsuo (IKEF 75) kaj s-ro Roland ROTSAERT (IKEF 3) estis reelektitaj kaj s-ro Sílvia KNISS MATES, Brazilo (IKEF 250) nove elektita. La nombro de estraranoj reduktiĝis de sep al ses.

Sekvis prezentado de kelkaj ĉeestintoj pri siaj entreprenoj.

Ĉefaj temoj dum la ĝenerala diskutado estis komercado inter esperantistaj komercistoj kaj terminika/terminara laboro de IKEF. Kvankam tiu lasta agado estas gravega por nia fakgrupo – same kiel por ĉiuj fakaj asocioj – ne anonciĝis novaj kunlaborantoj.

Tre interesa kaj informriĉa estis je 29 julio 2003 la vizito al la Komerca Altlernejo, parto de la Universitato de Gotenburgo, kiun partoprenis denove 25 personoj, membroj kaj interesitoj. Nia membro s-ro Bo SANDELIN (IKEF 134), profesoro de tiu lernejo, akceptis la vizitantojn, tre faksperte prezentis la altlernejon kaj donis superrigardon pri la sveda ekonomio kompare al la Eŭropa Unio.

Do, kiel dum la antaŭaj UK-oj, IKEF povis aranĝi ankaŭ en Gotenburgo tian viziton ĉe ekstera instituto rilatanta al nia fako ekonomio/komercado. Ĉi tio estas ĉiama ero de nia agadplano.

### **Komercado inter komercistoj esperantistaj**

En ĉiu numero de 'La Merkato' aperis anoncoj pri komercaj petoj kaj proponoj. Ni aperigas ilin senpage. En 2003 la nombro denove plialtiĝis al 34. (2002: 28, 2001: 21). Samtempe ili aperas en la rubriko 'Komercaj anoncoj' de nia retpaĝaro [www.ikef.org](http://www.ikef.org).

Krome nia ĉina peranto kaj estrarano s-ro WANG Tianyi (IKEF 117) ofertas sur sia retejo [www.komerco.com](http://www.komerco.com) siajn servojn. Instigon al komercado per Esperanto donas ankaŭ la retlistoj [per-esperanto-internacia-komerco\(a\)yahoogroups.com.br](mailto:per-esperanto-internacia-komerco(a)yahoogroups.com.br) (internacia komercado per Esperanto kun konkretaj ofertoj pri varoj kaj servoj) kaj [per-esperanto-komerco-informoj\(a\)yahoogroups.com.br](mailto:per-esperanto-komerco-informoj(a)yahoogroups.com.br) (teorio kaj ĝeneralaj informoj pri internacia komercado). Ambaŭ restlistoj estas administrataj de nia

---

membro s-ro Fabricío VALLE (IKEF 325).

Per tio kiel ankaŭ per retroŝto la komunikado inter la komercistoj bone funkcias. Aparte niaj ĉinaj membroj multe komercas kaj komunikas kun samideanoj en aliaj mondopartoj.

En D.R. KONGO establiĝis KKR (Kongolanda Komerco-Reto). Kunordiganto estas nia membro s-ro Emile MALANDA NIANGA (IKEF 300). Celo estas inter alie eksportado, importado, investado.

#### Aliaj praktikaj agadoj

En nia retpaĝaro la forumo plilarĝiĝis. Krome ni registrigis [www.ikef.net](http://www.ikef.net) kaj [www.ikef.info](http://www.ikef.info), por eviti ke la IKEF-retpaĝoj dumtempe estus nelegeblaj pro foje nefidinda [www.ikef.org](http://www.ikef.org).

Laŭ invito de estrarano prof. Ooba Atsuo, alia estrarano, d-ro Rainer KURZ, faris en marto 2003 esperantlingvan prelegon al la profesoroj de la ekonomika fakultato de Obirin Universitato (Tokio) pri la eŭropa telekomunika industrio.

Krome Rainer KURZ eldonis fine de 2003 tricent videobendojn de sia intervjuo kun la germana Nobel-premiito Reinhart SELTEN. La intervjuon li faris en la antaŭa jaro, kaj ni plurfoje raportis pri tio. Intertempe multaj kopioj de la videobendo estas disdonitaj al la Esperantistaro por engrupa montrado. Rainer KURZ ankaŭ prezentis la intervjuon ĉe la IKEF-informbudo dum la UK en Gotenburgo.

Nia membro Janek BENDER (IKEF 298) kiel en la antaŭa jaro ankaŭ en 2003 sukcesis fari Esperanto-kursetojn en sia firmaego ROBERT BOSCH GMBH, Stuttgart.

#### Resumo

Ankaŭ en 2003 daŭris la regreso de niaj agadoj. Multaj membroj ne partoprenas en celtrafaj agadoj (laŭ nia statuto kaj laborplano). Se ili ankaŭ ne plu pagas sian kotizon, kaj se sekve la estraro estas devigata eklogi ilin, estas ja konsekvenca sinteno, sed tio ne prosperigas nian fakgrupon.

Sendube la estiĝo kaj disvastiĝo de Interreto kaj retroŝto koncentrigas multe da

---

agadoj sur tiu (nepagenda) kampo. IKEF devas adapti siajn strukturojn kaj labormetojn al tiu siutacio.

Por la Estraro: Franz Josef BRAUN; Prezidanto

#### **Financa raporto pri IKEF dum la jaro 2003**

La spezokonto kaj bilanco troviĝas je la mezaj paĝoj de ĉi tiu revuo.

Post kelkaj jaroj kun malprofito, la spezokonto pri 2003 denove montras profiton, nome 415,99 EUR. Tamen, tio ne devenas de la aktiva agado de IKEF, sed precipe de manko de agado. Dum 2003 tute ne estis elspezoj pro terminologia laboro. Ankaŭ la kostoj de korespondado iom malkreskis.

La ĉefaj eroj (membrotizoj, La Merkato) restis stabilaj. La kostoj je 'specialaj agadoj' rilatas al eldono de kroma numero de La Merkato pri 'La Stelo', verko de IKEF-kunfondinto Lawrence MEE. Tiuj kostoj estis parte kompensitaj de pasintjara donaco lia al la subtена fondaĵo.

La granda sumo en 'kaso' rilatas al pago ricevita en la persona konto de la kasisto, kiun ne eblis antaŭ la jarfino ĝiri al IKEF-konto. De niaj pasintjaraj eldonoj estas vendataj nur po kelkaj ekzempleroj jare. Necesus pli aktive varbadi por reakiri la kapitalon investitan en ĝi.

Mi atentigas pri ekzisto de la patrona fonduso kiu ebligas al interesitoj kiuj ne kapablas pagi kotizon tamen iĝi membro de IKEF. Donacoj estas bonvenaj!

Roland ROTSAERT, financa konsilanto.

#### **IKEFa forumo denove funkcias**

Je <http://www.tradetunnel.com/bbs/index.asp> IKEF-membro James Zheng kreis novan IKEF-forumon. Ĝi nun ankaŭ akceptas la esperantajn literojn. La ligo ekde la IKEF-retpaĝoj ([www.ikef.org](http://www.ikef.org), [www.ikef.net](http://www.ikef.net), [www.ikef.info](http://www.ikef.info)) estas adaptita.

#### **Nova adreso**

243. Alexandar Zahariev, 15-B Bunaja Str., BG-1505 SOFIA, Bulgario, rete [avzbg\(a\)yahoo.com](mailto:avzbg(a)yahoo.com)

---

### **Komercaj petoj kaj proponoj (uzu ankaŭ reklamejon je [www.komerco.com](http://www.komerco.com) !)**

#### Ĉinio

En urbo Nanchang ni tre bezonas **teknikistojn**, kiuj bonkomprenas la maŝinojn pri cigaredofabrikado. Ni ankaŭ tre bezonas esperantistajn instruistojn, kiuj povas instrui la anglan lingvon. ([venkon\(a\)nc.jx.cn](mailto:venkon(a)nc.jx.cn))

Ĉina firmao volas aĉeti grand-dimensiajn **torni-maŝinojn** (Milling / Planer / Drilling / Boring / Vertical-Lathes Machines) ne novajn, sed bonfunkciajn, el bankrotitaj fabrikoj kaj uzinoj en ekssocialismaj landoj (Eŭropo) kaj aliaj. Kutime tiaj maŝinoj estas grandaj kaj pezaj (ĉ. kelkdek tunojn). Tiaj maŝinoj havas bonan merkaton en Ĉinio. Interesitoj turnu al la ĉina peranto de IKEF s-ro WANG Tianyi (Ĉielismo). Rete: [informo\(a\)komerco.com](mailto:informo(a)komerco.com), [komerco\(a\)public.xa.sn.cn](mailto:komerco(a)public.xa.sn.cn), [esp\(a\)pub.xaonline.com](mailto:esp(a)pub.xaonline.com), [www.komerco.com](http://www.komerco.com), tel.: 0086-29-82242215, fakso: 0086-29-82262952.

#### Irano/Japanio/Ĉinio

Jen oferto de irana samideano kiu intencas eksporti pistaĉion (kuiritan). Ĉu vi pensas, ke pistaĉio havas merkaton en Ĉinio? Se vin interesas lia propono, unue bonvolu kontakti min. Poste mi demandos la iranano samideanon rekte kontakti vin. Yasuharu Maeda (Printempo), 464 Ryuganji, Tamana city, Kumamoto pref., 865-0061 Japan, tel: +81-50-7509-6036, mobile: +81-80-3180-7379, HK WebFax: +852-2900-3396.

#### Ukrainio

1. Estas intereso pri suveniraĵoj el Sudameriko kaj Afriko. Bonvolu sendi fotojn de la specimenoj
2. Se en Afriko estas produktata kotono (krudaĵo), ni petas oferton ĉi teman.

Mikaelo Lineckij, UEA-Delegito por Kijivo (Ukrainio), respondadreso: [linec-kij\(a\)ukrpost.net](mailto:linec-kij(a)ukrpost.net), rezerva adreso [esperanto\(a\)uafree.net](mailto:esperanto(a)uafree.net).

---

#### Uzbekistano

##### Hotelo 'Esperanto' konstruota: partneroj kaj investantoj serĉataj

Posedante grandan privatan domon kun vasta korto en bela vilaĝa ĉirkaŭaĵo de Samarkando, mi planas konstrui sur ties bazo (0,3 hektaro) tradicistilan moderne ekipitan 'B&B' hotelon nomotan 'Esperanto'. Tiucele mi jam arigis duonon de la bezonataj konstrumaterialoj kaj nun mi invitas interesitajn alilandajn partnerojn kaj investantojn por fondo de komuna entrepreno aŭ iu aliforma kompanio, kiuj nun ĝuas signifajn impostajn avantaĝojn en nia lando. Mi volonte gastigos ĉiujn interesitojn, kiuj povus surloke esplori eblojn de tiu ĉi interesa kaj reciproke profitdona projekto en la monde konata turisma centro. Por pliaj informoj aŭ negocproponoj ne hezitu kontakti la posedanton: S-ro Holikberdi KOZIMOV, PULIMUGOB qishlog'i, Samarkand tumani, UZ - 704451 Samarkand viloyati, UZBEKISTANO, retadreso: [holikmam\(a\)mail.ru](mailto:holikmam(a)mail.ru), [imps\(a\)rol.uz](mailto:imps(a)rol.uz) .

##### TAKE: nova abontarifo

En numero 40 (oktobro 2003) de sia revuo 'La Domo', TAKE anoncis novan abonkotizon. Por 5 EUR abonanto ricevos unu jarkolekton de La Domo (3 simplajn numerojn + 1 ampleksan teknikan numeron). Sekve, la komuna kotizo IKEF/TAKE iĝos 17 EUR. Membroj kiuj intertempe pagis laŭ la malnova tarifo kompanse ricevos la TAKE-revuon dum pli longa periodo. Pri tio estos mencio sur la adresetikedo.

##### Kondolenco

Dum trafoliumado de la organo de la ĉeĥa Esperanto-Asocio, STARTO, n-ro 3/2003, ricevita antaŭ kelkaj semajnoj de mia slovaka amiko Miro Zavodsky, mi hazarde legis sur paĝo 94 sub rubriko 'Ni kondolencas':

'La 26-an de junio 2003 forpasis Inĝ. Jiri Vomáčka, prezidanto de la klubo en Plzen, en sia 51-a jaro. Li estis mecenato de la klubo kaj organizanto de la tendaroj en Nekvasovy.'

Jiri Vomáčka estis IKEF-membro (numero 172) ekde 1993. (fjb)

---

(en papera versio: spezokonto kaj bilanco)

---

(en papera versio: spezokonto kaj bilanco)

---

### Oferti servojn, ne lingvon.

Antaŭ la demando, ĉu la internacia komerco bezonas Esperanton ni respondu senhezite tute ne, ĉar fakte ĝi neniam bezonis Esperanton. Se vi dubas pri nia respondo, observu la ciferojn de la internacia komerco. En kiu lingvo oni tiom grandskale interkomercadis? Certe ĉefe en la angla. Ĉu ĉio okazas sen lingvaj problemoj? Certe ne. Ni ja povos enlistigi jurajn bataladojn pro lingvaj problemoj en la redaktado de kontraktoj, malfacilaĵojn por glata komunikado, avantaĝon komercan por la denaskaj parolantoj de la angla kaj similan problemojn.

Tamen, ni forlasu la ideon paroli al la profesiuloj de la internacia komerco kaj entreprenistoj eskportantaj kaj importantaj pri la mirinda Esperanto, ĉar entreprenistoj rezonas entreprenisme. Esperanto, kvankam plej regula lingvo, plej facile lernebla kaj kun bela manifesto redaktita en Prago, kun riĉa enhavo pri lingvo-politiko kaj lingvaj rajtoj, ne havas la plej gravan karakteron kiuj interesiĝas al entreprenistoj kaj profesiuloj de la internacia komerco, nome konkretan eblecon tuj uzi ĝin.

Do, ĉu ni nenian ŝancon havas? Senhezita respondo: ni ja havas ŝancon, tamen ne laŭ la vojo tradicia, per konvinkado per argumentoj bazitaj sur la teoriaj avantaĝoj de Esperanto.

Nia vojo nepre estu prezenti konkretan, tujan kaj efektivan alternativon por glata kaj praktika intraesperanta internacia komercado, nome servojn.

### Sekvinda kariero por esperantistoj

Esperantistoj gajnu monon per internacia komerco. Lerni Esperanton kaj labori por ĝi povas esti afero de amatoroj, hobiuloj, idealistoj, ktp, sed ekstera komerco estas afero nur por profesiuloj. Do, internacia komerco estas afero por homoj kiuj volas gajni monon per eksportado kaj importado. Oni postulas profesiecon. Uzo de Esperanto estas lingva detalo.

Interalie ni bezonas junajn esperantistojn kiuj volu fari karieron sur la kampo de internacia komerco. Ni bezonas entreprenistojn parolantajn Esperanton. Tamen, nia lingvo ne povas esti la kerno de la negoco. La kerno estu komerco kaj ties kompleksa detalaro. Esperanto rolu kiel lingva faciligilo, cetere tre utila, tamen ne pli unuamomente ol lingva detalo.

---

### Ja servoj, ne lingvo

Esperantistoj ofertu al entreprenistoj ne Esperanton, sed profesiajn servojn en Esperanto. Por ekzemplumi, ni imagu la jenajn situaciojn:

1. Esperantisto iras al fabriko de ŝuoj kaj parolas pri la bonaĵoj de Esperanto, proponante ĝin kiel laborlingvon por eksportado al pli ol 100 landoj. La komerca direktoro de la fabriko demandas: 'Kie estas la importantoj de ŝuoj parolantaj Esperanton? Kiuj estas miaj potencialaj partneroj? En kiuj landoj?' La esperantisto respondas: 'Ili preskaŭ ne ekzistas, ĝis nun ni havas nur la lingvon, la plej bonan alternativon por internacia komunikado. Ĉu vi jam legis la Manifeston de Prago?' Kompreneble la entreprenisto rezignos pri Esperanto.
2. Esperantisto iras al la sama ŝu-fabriko kaj proponas servon por eksportadon de ŝuoj al 3 landoj, kie li jam havas profesiajn partnerojn agantajn sur la kampo de importado. Ĉiuj jam faris merkatan esploron, kaj konstatis, ke estas grandaj eblecoj por importado de bonkvalitaj ŝuoj. Potencialaj klientoj jam estis anticipe kontaktitaj kaj pretas konkrete esplori oferton. Kompreneble, certe io konkreta povos okazi ĉi-kaze.

Do, anstataŭ proponi lingvon, la esperantistoj agantaj sur la kampo de intraesperanta komerco devas plioftigi kaj intensigi la kontaktojn inter si cele al starigo de konkretaj servoj por la entreprenoj kaj importantaj kaj eksportantaj.

### Konkludo

Se esperantistoj opinias Esperanton la plej taŭga lingvo por internacia komerco, oni unue pruvu sian propran recepton kaj havigu al si sukceson, kaj nur poste oni ofertu la kukon al la skeptikuloj. Kaj plie: esperantistoj komprenu ke la internacia komerco ne bezonas Esperanton, sed tute kontraŭe, estas Esperanto kiu ja bezonas la internacian komercon.

Kiam ni sukcesos uzi Esperanton profesie kaj kompetente, tiam la statistikoj de la intraesperanta internacia komerco agnoskos nian lingvon, kaj la Manifesto de Prago fariĝos tre populara kaj same agnoskita. Kaj la entreprenistaro, malkovrinte en la praktiko la avantaĝojn de Esperanto, amase eklernos ĝin, ĉar ĝi sendube estas la lingvo plej facile lernebla en la tuta mondo.

Fabrício VALLE, [fabriciovalle\(a\)redeesperanto.org.br](mailto:fabriciovalle@redeesperanto.org.br)

---

### **Skype: revolucia ilo por la E-movado**

Eble, vi scias ke pluraj esperantistoj jam uzas novan ilon por komuniki kun amikoj tra la mondo, voĉe, efike kaj tute senpage!

La softvaro Skype [Skajp'] ebligas uzi vian PC-on kiel telefonon, kondiĉe ke ĝi havu mikrofonon. La softvaro troviĝas ĉe <http://www.skype.com>. Ĝi estas plurlingva. La E-versio estas nune farata kaj normale ĝi estos oficiale inkluzivita en la softvaro. Ekzistas helppaĝo en Esperanto far samideano E. Cid el Brazilio je <http://www.esperantointernacia.hpg.ig.com.br/skype.htm>. La skajp-uzantoj havas sian retliston je <http://groups.yahoo.com/groups/skajpanoj>.

Oni povas diri ke ĝi funkcias mirinde bone. Estas ne tro da malfruo en la parolo, kaj la voĉo sonas eĉ pli bonkvalita kelkfoje ol normala telefono, tiel ke oni povas havi strangan impreson de proksimeco, eĉ parolante kun iu sur alia kontinento. La softvaro estas senpaga, tute laŭleĝa, funkcias eĉ per modemoj (56K), tute ne ĝenatas de la kontraŭfajrigiloj, kaj entenas nek reklamon nek spionvaron. Sola malavantaĝo estas ke momente, ĝi funkcias nur per Vindozo (minimume versio 98), sed oni promesas ontan version por Macintoŝo kaj Linukso.

Ekde nun, E-asocioj teorie povus komuniki voĉe kun pluraj landaj filioj, tiel ŝparante la monon de la asocio!

Memoru kia enorma progreso estis la Interreto por la Esperanto-movado. Plejparto el ni povis konkrete praktiki Esperanton nur dum ferioj, do nur dum kelkaj semajnoj jare. Kaj de kelkaj jaroj, dank'al la Interreto, ni povas komuniki ĉiutage en Esperanto. Ĝis nun, temis nur pri skriba komunikado, ĉar internacia telefono tro multekostis, kaj ne vere estis agrablaj interretaj paroliloj. La interreton alportis tamen tiun grandan progreson de ĉiutaga komunikebleco. Sed nun alvenas nova epoko, ekde kiam denove dank'al la Interreto, ni finfine povos uzi nian lingvon ĉiutage, ankaŭ parole!

Se vi ankoraŭ ne konas amikojn de vi, kiuj ĝin uzas, vi tute rajtas provi alvokante min, ekzemple al mia profesia adreso 'linguaforce' inter 9H kaj 19H GMT.

Aliteme, ĉar profesie mi laboras en kampo de tradukado, mi havis ideon uzi tiun novan ilon, kiu bone funkcias, kun alia pli malnova ilo, sed kiu ankoraŭ mirinde bone funkcias: Esperanton. Mia celo estas provi starigi servon de telefona interpre-

---

tado (voĉa tradukado) inter pluraj landoj. Tion servon uzas homoj en entreprenoj, kiam ili volas komuniki ekzemple kun kliento eksterlande. Intepretisto tradukas siajn parolojn al la alia homo kaj inversen. Tion teorie eblas fari kun Esperanto kiel pontolingvo, des pli ke jam ekzistas kelkaj tradukkompanioj, kiuj jam faras tion per la angla lingvo, kvankam ĝi estas esence multe pli fuŝa kaj malklara ol Esperanto.

Se interesas vin, aŭ si vi konas esperantiston kiun tio povas interesi, skajpu min por havi pliajn klarigojn. Ni serĉas interesatojn en ĉiuj landoj de la mondo (kaj ĉefe en Eŭropa Unio, Nordameriko kaj Azio, kie estas nune la plej eventualaj konkretaj bezonoj) por fari provojn.

Philippe Bérizzi

(skajpu min ĉe konto 'linguaforce', tel: +33 1 30 30 66 63, IP tel Skype : linguaforce, fakso: +33 1 34 25 84 56, [www.linguaforce.com](http://www.linguaforce.com), retadreso: [pberizzi\(a\)linguaforce.com](mailto:pberizzi(a)linguaforce.com) aŭ [linguaforce\(a\)online.fr](mailto:linguaforce(a)online.fr).)

### **Aperis nova libro pri terminologio**

Jan Werner: Terminologiaj konsideroj, KAVA-PECH, 2004, 180 p., 14 x 20 cm. Ĉefa enhavo: ĝenerale pri faka apliko de Esperanto kaj pri terminologio; terminologiaj principoj; leksikaj observoj kaj instigoj; prilingvaj konsideroj; esperanta terminaro de terminologia fako. Vidu ankaŭ je [www.kava-pech.cz/u/oferto.htm](http://www.kava-pech.cz/u/oferto.htm).

### **Nova retpaĝaro por aziaj komercistoj**

La hejmpaĝo 'Esperanto-komercio en Azio', [www.esperantujo.net](http://www.esperantujo.net), celas disvastigi kaj utiligi la valorecon de Esperanto en la kampoj komercio kaj ekonomio inter komercistoj, kiuj uzas Esperanton en Azio-regiono. La hejmpaĝo funkcios por:

- \* interŝanĝi komercajn informojn inter aziaj komercistoj,
- \* aktuala komerca laboro pere de Esperanto,
- \* disinformado de Esperanto al aziaj komercistoj, kiuj ankoraŭ ne scias Esperanton.



---

### **Komerc-Industria Ĉambro prezentas sin en Esperanto**

La retejo de la Komerc-Industria Ĉambro de Chuvasha Respubliko (Centra Rusio) ekde nun havas ankaŭ E-lingvan version, apud la rusa, angla kaj itala. La E-version de la paĝaro prizorgas Aleksandr Blinov, aktiva esperantisto kaj oficisto de la Ĉambro. [Je redaktfino de LM, nur la strukturo de la paĝaro estis esperantigita; la enhavo ĉefe estas rusa kaj angla. - rr]

La paĝaro celas antaŭenigi komercan kunlaboron inter la entreprenoj de la respubliko kun la tuta mondo. Ĝi havas regulajn kontaktojn kun komercistoj kaj industriistoj de tuta Rusio kaj de dekoj da eksteraj landoj. La paĝaro ofte mencias Esperanton, ĉefe pro la regule okazantaj en ĝi seminarioj, preparataj de ĉeboksaraj e-istoj. (I.a. pro tio fine de decembro 2003 oni havis neatenditan sukceson informi pri E-agado la prezidenton de Rusio Vladimir Putin. Kiam li vizitis Moskvon Komercan Ĉambro, la reprezentanto de Chuvashio montris al li la paĝaron kaj komentis la tiamajn novaĵojn, inter kiuj elstaris E-rilataj).

Adreso: [www.tppchuvashia.ru/eo](http://www.tppchuvashia.ru/eo).

A. Grigorjevskij

### **Eŭropa Unio helpas al komercistoj el tria mondo**

Je <http://export-help.cec.eu.int/> la EU kreis helpservon por komercistoj. En ĝi estas i.a. doganaj tarifoj, statistikoj, regularoj, ktp., kiuj celas plifaciligi la eksporton el evolulandoj al EU. La paĝaro estas nur en angla lingvo. Tamen, estas klarigaj paĝoj parte ankaŭ en franca, hispana kaj portugala. Vidu je:

[http://europa.eu.int/comm/trade/issues/global/development/thd\\_en.htm](http://europa.eu.int/comm/trade/issues/global/development/thd_en.htm) (anstataŭ la 'en' je la fino per 'fr' por franca, 'es' por hispana kaj 'pt' por portugala).

### **IKEF-retpaĝoj nun (parte) ankaŭ en rusa lingvo**

Dank'al helpo kaj konsiloj de ESPERANTO-SERVOCENTRO, [esperanto-\(a\)email.ru](mailto:(a)email.ru), [www.servocentro.com](http://www.servocentro.com), la ĉefaj tekstoj de la IKEF-retpaĝoj estis tradukitaj al rusa lingvo. Krome, ĝi sugestis kelkajn ĝeneralajn plibonigojn kaj korektojn.

---

### **Internacia pakportalo en Esperanto**

Manel Vinyals kunkreis Esperanto-entreprenon, tre novtipan: internacian retportalon: [www.abc-pack.com/eo](http://www.abc-pack.com/eo). Post la oficiala lanĉo de ties esperantlingva fako, meze de februaro, La Merkato interparolis kun la protagonisto de tiu komerca aventuro por prezenti ĝin al siaj legantoj. Intervjuis Héctor Alós i Font.

— *Manel, vi estas esperantisto de jam dudek jaroj kaj entreprenisto ankaŭ delonge. Kio instigis vin nun kunigi la du aferojn?*

— Dum mia pasintjara vojaĝo ĉirkaŭ la mondo, mi kontaktis multajn esperantistojn, kaj rimarkis, ke ekzistas landoj, kiel Ĉinio, kie Esperanto kaj komercado bone kongruas. Ne ĉie, kiel ĉe ni, oni rigardas Esperanton nur kiel interesan kultur-riĉigan ŝatokupon. Ĉefe dum la transnavigado de Pacifiko estis multe da tempo por cerbumi, kaj jen.

— *Ĉu vi povas iom klarigi pri kio temas la tuta projekto?*

— Temas pri retportalo pri pakado kaj enujigo. En ĝi ĉiu povas senpage konsulti enciklopedion pri terminoj, uzoj, materialoj kaj aplikadoj. Se mankas informo, eblas ankaŭ senpage konsulti fakulon. Krome ĉiutage, kiel en ĉiu portalo, aperas novaĵoj pri la sektoro. La portalo estas plurlingva: ĝi aperis jam en la hispana, angla, franca kaj Esperanto. Ĝi krome estas internacia: ekzistas konsultistoj sudafrika, israela... La fako estas tre ampleksa, kaj neniu ĉion scias.

— *Nu, se ĉio senpagas, kie estas la gajno?*

— Ne ĉio estas tia. Parto de la portalo enhavas liston de entreprenoj, kiuj anoncas sin. Tiuj entreprenoj ja pagas. Aliĝi al la registro de liverantoj en du el la ses fakoj, en kiuj oni dividis la sektoron, kostas 180 eŭrojn; aliĝi al ĉiuj, 350 eŭrojn. Krome ekzistas aliaj prezoj por pli videblaj reklamoj. Nuntempe oni kalkulas, ke investado por atingi unu komercan kontakton postulas 200 eŭrojn: unu sola kontakto en la jaro sufiĉas por pravigi la investon.

— *Do, la ŝlosilo por la sukceso de la entrepreno kuŝas en la atingo de tiuj entreprenoj sin reklamantaj?*

— Fakte, ne. La sukceso ĉefe dependas de la aliĝo de sufiĉe multaj uzantoj. Se ni

---

atingas uzantojn, ne estos malfacile altiri reklamantojn.

— *Kiel ĉio ĉi rilatas al Esperanto? Ĉu vere vi kalkulas, ke ĝi alfluigos sufiĉajn homojn por pravigi la uzadon de la lingvo?*

— Esperanto funkcias parte kiel punta lingvo en la tuta projekto: ni volas aliri landojn, kie la angla ne estas tre disvastiĝinta, kaj granda parto de niaj internaciaj kontaktoj estas esperant-lingvaj. Tial la tekstoj devas esti en Esperanto. Ni ŝatus uzi la internacian lingvon ankaŭ kiel pontolingvon en la konsultoj: ekzemple iranano povas starigi demandon respondotan de hebrelingvano; necesas interlingvo, ĉar nia konsultisto ofte ne scipovos la lingvon de la demandinto. Sed, pli grave, la traduk-servo estos centrigita: ĉiu novaĵo kaj ĉiu nova enhava ero iros de la kreanta lando al la centro en Esperanto. Nia traduk-servo resendos ĝin al ĉiu nacia oficejo, por ke oni traduku ĝin al alŝuto en sian TTT-ejon. Tiamaniere ĉiun novaĵon el kiu ajn parto de la mondo miloj da homoj povos koni en un semajno. Ni tre interesiĝas pri la uzo de aŭtomataj tradukiloj, sed bedaŭrinde Elitrad, ŝajne la sola disponebla en Esperanto, estas tro elementa kaj ne taŭgas por nia celo. Nuntempe la enirpaĝo de la portalo estas la hispana (aŭ la franca, se oni alvenas per [www.abc-pack.net](http://www.abc-pack.net)), sed ni antaŭvidas krei frontpaĝon kun mapo, kie ĉiu uzulo elektos sian lingvon.

— *Vi diris, ke la funkciado kiel punta lingvo estas nur parto de la rolo de Esperanto en la projekto. Kio plia, do?*

— Mi devas malkaŝi, ke la kerna ideo de tiu projekto estis de iu mia amiko. Li planis ĉion funkciigi en la angla kaj kalkulis, ke necesos 500.000-eŭra investo. Mi diris al li, ke mi kredas ĝin ebla nur kontraŭ 60.000, sed uzante la esperantan reton: starigi firmaon en Ĉinio, ekzemple, postulas grandan monsumon kaj sperton pri la lando, sed la Esperanto-movado jam tie funkcias, havas ejojn kaj komercas; la investoj draste reduktiĝas. La tuta ideo de la portalo baziĝas en la uzado de ĉiuj sinergioj de la tutmonda Esperanto-movado kaj ties lokaj oficejoj, kiuj ĝuste –laŭ mia vidpunkto– plej gravas, ke ili estu fortaj kaj viglaj.

— *Tio ŝajnas sufiĉa kialo por uzi Esperanton en la projekto. Kiel rigardas al la afero viaj kuninvestantoj, kiuj ja ne estas esperantistoj?*

— Ili konas Esperanton kaj fidus pri la projekto. Ili scias, ke en la mondo estas multaj esperantistoj petantaj pri komercaj projektoj en Esperanto. ABC-Pack povas esti grava ideo en tiu senco, sed mi certas, ke poste naskiĝos aliaj projektoj.

---

— *Se mi bone komprenas, Esperanto utilas por aliri unualoke la merkatojn ĉinan kaj iranan, sed por tion efektiviĝi necesos traduki la portalon al la ĉina kaj al la persa. Konkrete, kiel funkcios la diversaj landaj filioj de la projekto?*

— Por ĉiuj taskoj pri tradukado, aktualigo de la TTT-ejo kaj serĉado de enhavoj kaj reklamoj en ĉiu lando, ABC Enciklopedioj pagos 40-procentan makleraĵon por la reklamoj venintaj el la koncerna lando kaj 10-procentan por ĉiuj reklamoj ricevitaj el aliaj landoj. Se la lando malhavas traduk-servon kaj propran TTT-ejon, la provizio estos 30% pro la atingitaj reklamoj. Tiuj monsumoj povas fariĝi tre gravaj por la vigligo de la lokaj Esperanto-societoj.

— *Kaj, mi scivolemas, kial specife portalo pri pakado?*

— Pakado estas mia fako, ĝin mi plej bone konas kaj mi havas kontaktojn per ĝi. Tial ĝi estas bona deirpunkto. Tamen, se la afero montriĝas sukcesa, ni jam fondis la entreprenon ‘ABC Enciklopedioj’ (tiamaniere registrita, en Esperanto) kaj antaŭvidas disvastiĝi al aliaj fakoj. Ni jam interkonsentis pri fruktoportalo principe lanĉota en 2005. En tiu okazo, la diversaj delegacioj devos dungi spertulon, kiu estos la fakon en ĉiu lando. Sed se ĉio bone progresas, la afero ne restos nur ĉe pakado kaj fruktoj: ni antaŭvidas ankaŭ meblojn kaj multajn aliajn.

— *Nu, kiuj estas viaj financaj planoj? Kiam vi scios, ĉu vi gajnis la veton aŭ ne?*

— Mia sperto kiel entreprenisto montras al mi, ke en du jaroj oni scios, ĉu la afero sukcesis aŭ ne. Fine de 2004 ni antaŭvidas pli-malpli kvitiĝi kaj en 2005 la firmao jam devus esti profita. Fakte la interkonsento kun Kataluna Esperanto-Asocio por tradukaj servoj estas por tiu du-jara provperiodo.

— *Jes, kaj ni same kiel vi tre interesiĝas pri la sukceso de la entrepreno. Kiel leganto de nia revuo povus kontribui?*

— Kiel mi diris, la esenca punkto en la veto estas atingi sufiĉe multajn uzantojn. En tio, la diskonigo de la portalo estas esenca. Se iu havas rilaton kun ebla uzanto, nepre li konigu ĝin. Aliflanke, ni petas al ĉiuj esperantistaj asocioj en la mondo: fariĝu delegitoj de ABC Enciklopedioj kaj helpu nin en tiu projekto. Ni, ĉiuj, bezonas unu-du jarojn da laboro kaj mi certigas, ke ili rezultos tre fruktodonaj. Informiĝu ĉe [info\(a\)abc-pack.com](mailto:info(a)abc-pack.com).